

Eŭropa Bulteno

Sendependa esperantlingva ret-bulteno
por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

Aprilo 2000. N-ro 5

Redaktas:

Umberto Broccatelli - Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio
Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio
u.broccatelli@tiscalinet.it, tel./fakso +39-0687135019

"Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj sxtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo" Hamilton, The Federalist

* * * * *

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri Eŭropa Esperanto-Unio (EEU-informilo) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (Eŭropa debato). Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso <u.broccatelli@tiscalinet.it>; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

EEU - INFORMILO

En la numero 2/2000 de "l'esperanto", organo de Itala E-Federacio, aperis la itallingva teksto de deklaro, kiu povus utili kiel bazo de rezolucio proponota al la EEU-kongreso en Ostendo. Ĝi estas uzebla ankaŭ por kolekti subskribojn de apogo al la propono "Konstanta konferenco". Jen la esperanta traduko. La teksto estis jam tradukita al la franca de nia franca EEU-komitato, Claude Longue Epée. Ni sugestas ke ankaŭ en aliaj landoj oni faru la samon.

POR KONSTANTA KONFERENCO DE EŬROPA UNIO PRI LA EŬROPA LINGVO-PROBLEMO

I

La subskribintoj, konsiderante ke multobligas denuncoj fare de lingvistoj kaj de eminentaj kleruloj pri la riskoj de progresiva marĝeniĝo de niaj lingvoj favore al la angla lingvo; konsiderante ke lingvo estas ne nur komunikilo, sed nepre necesa esprimilo de iu kulturo, kiu sen ĝi ne povas pluvivi; prikalkulante do ke la dirita risko koncernas la eŭropan identecon mem, kies esenco kuxas ĝuste en la plureco de la kulturoj de la Malnova Kontinento,

II

rimarkante krome ke la lingva reĝimo nuntempe reganta en E.U. - de laŭnoma egalrajteco de ĉiuj lingvoj - fariĝas des pli malfacila kaj multekosta ju pli kreskadas la nombro de la lingvoj de la Unio, kaj tial tiu egalrajteco iĝas pli kaj pli nur sxajna;

prikalkulante fine ke, se la unuiĝo de Eŭropo antaŭeniros, kiel estas dezirinde, kaj pli kaj pli alprenos politikan dimension kaj supernacian strukturon, ĝi devos solvi en malpli neadekvata kaj neefika maniero ol hodiaŭ la problemon de la intereŭropana komunikado;

III

konsiderinte ĉion ĉi, sugestas ke, pro iniciato de la aŭtoritatoj de E.U., kaj aparte de la Eŭropa Parlamento - la Unia institucio, kiu plej multe suferas la menciitajn lingvajn malfacilaĵojn - oni starigu Konstantan Konferencon pri la lingvoj, kiu prefere kunsidu ĉiujare en la sama urbo kaj je la sama dato, en kiu reprezentantoj de E.U. kaj de ĝiaj institucioj, naciaj politikistoj, lingvistoj, aparte kvalifikitaj kleruloj kaj fakuloj kaj reprezentantoj de la eŭropistaj organizaĵoj diskutu la lingvajn problemojn de Eŭropo kaj aparte tiun de la intereŭropana komunikado kaj proponu adekvatajn kaj ne iluziajn solvojn.

Dato..... Subskribo

.....
.

AL POLITIKISTOJ KAJ AL KLERULOJ ni petas subskribi tiun ĉi alvokon, kiu celas, ke la institucioj de Eŭropa Unio alfrontu la eŭropan lingvoproblemon surbaze de konkretaj donitaĵoj kaj priatentante diversajn vidpunktojn.

=====

Per ordinara posxto mi sendis leterojn kun tiu ĉi teksto, itallingva al kelkaj italaj E.P.-anoj kaj al kelkaj aliaj personoj. Ĝis nun alvenis kvar pozitivaj respondoj, kun subskribo de la deklaro: tiuj de la E.P.-anoj Pasqualina NAPOLETANO kaj Gianni VATTIMO, de la Demokratoj de la Maldekstro (PSE), kaj Enrico FERRI de "Forza Italia" (PPE), krome de prof-ro Francesco GUI, de la Roma Universitato. (U.Br.)

EL LA BRUSELA LABORGRUPO

La brusela kunveno "SCIC-Université 2000" de 27-03-2000;
"Interpretado kaj kvalito: la novaj defioj"

El la provizora raporto de Hans Erasmus pri la partopreno de la "Laborgrupo pri la lingvoproblemo en la Eŭropa Unio" en la antaŭnelonga kunveno del SCIC (Komuna servo de interpretado kaj konferencoj de la Eŭropa Komisiono) ni eltiras resume la esencajn punktojn.

En la renovigita konstruaĵo "Charlemagne" en Bruselo, SCIC kunvenigis reprezentantojn de universitatoj, altlernejoj kaj institucioj, kiuj okupiĝas pri edukado de interpretistoj. Krome ĉeestis interpretistoj kaj tradukistoj kaj aliaj instancoj. La partoprenantoj venis ne nur el la 15 landoj membroj de

EU, sed ankaŭ el aliaj landoj atendantaj membriĝon. La ĉi-jara Konferenco estas jam la kvara, kaj do ĝi estis taŭga okazo por renkonti antaŭajn partoprenintojn, por lobiadi kaj por paroli pri novaj projektoj.

La kunvenon fakte gvidis Noël Muylle, ĉefo de la servo pri interpretado, edukado de la interpretistoj kaj dokumentado, kun helpo de Brian Fox, vic-ĉefo pri edukado kaj instruado. Tamen la ĝenerala direktoro Tanzilli, italo, malfermis kaj fermis la konferencon kaj kelkfoje esprimis sian opinion.

Por la "Laborgrupo pri la lingvoproblemo en la Eŭropa Unio" (la t.n. "Brusela grupo") ĉeestis Hans Erasmus kaj Michael Cwik kaj, krome, la du prelegantoj, profesoroj Klaus Schubert kaj Marc van Oostendorp. En la enirejo sur tablo estis metitaj la du projektoj Neighbour kaj Relais en la diversaj lingvoj. Multaj partoprenantoj prenis ekzemplerojn.

Kelkaj el la raportoj pritraktis la helpilojn kiuj povas veni de la teknologio (firmao Lernhout & Hauspie de Kortrijk, Belgio) kaj de la novaj lernometodoj (Valère Meus de la universitato de Gent, Belgio). Jamie Shea, porparolanto de NATO, rakontis pri siaj spertoj dum la kosova krizo, per bonega raporto pri la diversaj aspektoj de informado.

Je matenfino la profesoroj Marc van Oostendorp kaj Klaus Schubert parolis pri la temo Apogo al multilingveco: esperanto kiel praktika ilo". En la duona horo disponebla ambaŭ prezentis bonegajn raportojn, klarigante la esencon de la projektoj Neighbour kaj Relais.

Pri ambaŭ temoj venis multaj demandoj, skribe prezentitaj dum la postbufeda paŭzo, al kiuj oni klopodis kiel eble plej taŭge respondi. Pluraj personoj demandis, ĉu vere oni apogos Esperanton, kaj s-ro Tanzilli respondis, ke tio estas malbona demando, ĉar "se iu havos bonan projekton, bonan ideon, kiu povus plibonigi nian sistemon, ni devos atenti kaj eventuale subvencii ĝin".

Tio estas por ni pozitiva aspekto.

Ni ne forgesu ke ni troviĝis sur danĝera kaj glitiga tereno. La aŭdantaro konsistis el lingvistoj kaj instruistoj de fremdaj lingvoj, kiuj aŭ nenion scias pri Esperanto aŭ havas antaŭjuĝojn. Krome ilia intereso estas plu edukadi studentojn pri fremdaj lingvoj kaj ili havas la senton kvazaŭ Esperanto estus minaco por ili. Tia sento, kvankam ne eksplicite deklarita, iel aperis en kelkaj demandoj: "Ĉu vi povas diri ion en Esperanto, por aŭdigi kiel tiu ĉi lingvo sonas?", "Ĉu oni povas sxerci en Esperanto?", "Ĉu oni subtenu lingvon sen kulturo?", "Ĉu ekzistas interna strukturo?", "Ĉu rekta interpretado ne estas supera al uzado de relajs-lingvo kiel Esperanto?".

Oni ankaŭ konsideru ke la bonegaj koncizaj raportoj de van Oostendorp kaj de Schubert estis eble tro sintezaj por iu kiu timas la novan lingvon. Krome iu, kiu havas antaŭjuĝojn aŭ timojn, ne bone aŭskultas aŭ tute ne aŭskultas kaj la respondoj ne ĉiam povis esti kompletaj en la mallonga tempo disponebla.

Oni povas konklude diri ke konsistigis grandan antaŭenpasxo la fakto, ke ni troviĝis en la tagordo de tiu konferenco. Tio donos al ni la eblecon pli bone difini la projektojn kaj peti helpon de la ĉeestintoj en la konferenco.

Plej bone estos ke minimume tri universitatoj aŭ aliaj institucioj de tri diversaj landoj ellaboru kaj gvidu la projekton.

Post la konferenco la brusela laborgrupo kunvenis la 28-03-2000 por ekzameni kaj decidi la pluajn pasojn farotajn.

Hans Erasmus

=====

NOVA DISSENDOLISTO pri la Eŭropa Agado de Esperantaj organizoj.

estas iniciatita de David FERGUSON <dafyddapfergus@yahoo.com>

PROVIZORAJ CELOJ

EŬROPA AGADO

1) Dissendolisto pri la Eŭropa Agado de Esperantaj organizoj celas diskuti kaj analizi la esperantistan (ne)politikon ĉe Eŭropaj instancoj.

2) Eŭropa Agado celas klarigi la kaŭzojn de la neefikecon de la ĝisnuna politiko kaj ekzameni aliajn alirojn al Eŭropa agado ĉe politikuloj kaj ĵurnalistoj.

3) Konsiderante la neefikecon de Esperantista agado ankaŭ kiel sekvon de la malprezenco de Esperantaj organizoj en la Eŭropa ĉefurbo, Bruselo, Eŭropa Agado celas informi Esperantistojn pri la graveco de Brusela oficejo kaj de vigla Esperanta vivo en Bruselo.

4) Esperanta Agado celas ligi homojn kiuj laboras en Bruselo aŭ profesie rilatas kun EU-instancoj. Ĝi ankaŭ celas atingi homojn kiuj sin interesas por reala Esperanta agado ĉe la EU.

5) Eŭropa Agado celas ekzameni la bildon de Esperanto en Bruselo kaj en amaskomunikiloj. Ĝi celas analizi la fortan prezencon de internaciaj amaskomunikiloj en Bruselo kaj ĝian potencon por Esperanta agado.

Se vi volas aliĝi al tiu listo, sendu mesaĝon al dafyddapfergus@yahoo.com

=====

MALFERMITA LETERO de Claude PIRLOT
Al la demokrataj partioj
Al batalantoj kontraŭ iu ajn diskriminacio

Oostende,

21.02.2000

Gesinjoroj,

Lasttempe temas multe pri la ekstrema dekstro en Aŭstrio. Mi akordas kun la reagoj, sed ne kiam iuj malalte taksas ĉiujn Aŭstrianojn sendiference kaj volas sankcii la tutan loĝantaron de tiu lando. Tio estas ja sensenca, ĉar troviĝas ksenofoboj en ĉiuj landoj de la mondo.

Tamen, granda plimulto de tiuj, kiuj emfaze paroladas pri la danĝeroj de la ksenofobio estas ĝenerale anoj, aktivaj aŭ pasivaj, de la glotofobio, kiu svarmas en la internaciaj rilatoj, tiu speco de senhonta diskriminacio kies

bazo estas la lingvo.

Ĝis nun Eŭropa Unio evitis ĝin "de jure" kun 11 oficialaj kaj labor-lingvoj, sed, pro la pligrandigo, kio altigus tiun nombron ĝis dudeko, oni pli kaj pli antaŭvidas limigi tiun nombron je tri: angla, franca kaj germana!

Aŭtomate tio signifas, ke la eŭropaj angle-france-germane-parolantoj estos pli respektablaj ol la aliaj "-lingvanoj". Ne al la ksenofobio; jes al la glotofobio! Dum renkontiĝoj inter Eŭropanoj, nur tiuj, kiuj parolas tiujn lingvojn rajtos esprimi sin tutlibere; jen bela demokratio! Tamen, kiaj estus la reagoj se, dum tiuj renkontiĝoj, iu proponus, ke nur la blonduloj, naturaj aŭ artefaritaj, havu la rajton paroli?

Ĉu vi povus klarigi al mi, kiel oni povas dece kondamni la ksenofobion (rasismo bazita sur la etno) kaj samtempe kuraĝigi la glotofobion (rasismo bazita sur la lingvo)?

Mi antaŭdankas kaj sincere salutas vin,
Germain Pirlot
Steenbakersstraat 21
BE-8400 Oostende

EŬROPA DEBATO

AL NICO POR EŬROPA DEMOKRATIO!
Federistoj manifestacios por Eŭropa demokratio.
Ĉu esperantistoj volos partopreni?

La 7an de decembro 2000, fine de la franca duonjaro de prezidado de Eŭropa Unio, okazos en Nico, en suda Francio, tute proksime de la nordaj regionoj de Italio, kunveno de la registarestroj kaj sxtatestoj de E.U., en kies tagordo estos la temoj de la reformo de la Uniaj institucioj kaj de la plilarĝigo de la Unio al novaj landoj. Versxajne tie oni subskribos novan Traktaton.

Tamen tio riskas fariĝi trompo al la eŭropanoj.

Manke de Konstitucio, kiu jure difinu la bazajn rajtojn de la civitanoj de Eŭropa Unio kaj kiu desegnu la trajtojn de eŭropa institucia sistemo, legitimita de ties civitanoj pere de agopova eŭropa Parlamento, la Unio ne kapablos alfronti la defiojn, kiuj atendas ĝin, kaj kiuj estas:

- la dramaj problemoj de senlaboreco kaj de socia marĝenigo;
- la neceso proponi al la mondo modelon de disvolviĝo, kiu garantiu la pacon kaj la solidarecon inter la nacioj la homajn rajtojn kaj la nepre necesan harmoniigon inter teknologia evoluo kaj gardado de la vivmedio;
- la plilarĝigon de la Unio al la eŭropaj landoj kiuj deziras aliĝi al ĝi.

Plilarĝigo de la Unio estas necesa, sed plilarĝigo sen demokratiaj institucioj igos la Union simpla libermerkata areo.

Reformoj estas jam nun malfacilaj, kun 15 decidantaj sxtatoj. Ili fariĝos ne

eblaj kun 28! Oni devas jam nun fari instituciajn reformojn eĉ limigite al parto de la uniaj sxtatoj. Ludu kiu volas kunludi kaj la ceteraj venos poste, se ili volos! La ĝusta metodo ne estas la diplomatia vojo sed la popola vojo, la konstituci-fara vojo!

La reformado de la Unio ne ests temo lasebla al la diplomataj konferencoj. Ĝi estas temo kiu tuxsas ĉiujn civitanojn, kiuj do rajtas rekte decidi pri sia estonteco per la iloj de demokratio.

Manko de eŭropa demokratio estas des pli zorgiga, se oni konsideras la okazantan renaskiĝon de la "naciismo de la malgrandaj patrolandoj", portanto de apartiĝemo kaj de fremdul-malamo.

La Unio bezonas konstitucion.

Federistoj manifestacios en Nico por postuli eŭropan demokration.

Aspekto de eŭropa demokratio estas la lingva demokratio.

Specife por ĝi devus manifestacii esperantistoj.

Estas antaŭvidata grandioza manifestacio, kiun la amas-komunikiloj devos priatenti.

Do ankaŭ niaj insignoj kaj niaj sloganoj ĉeestu kaj vidiĝu!

Kiu deziras partopreni en esperantista manifestacio en Nico, apud la federistoj, tiu sciigu tion al mi.

Mi sciigos kiel eble plej baldaŭ la adresojn de la diverslandaj organizaĵoj kiuj aranĝos

partoprenon en la manifestacio.

Umberto Broccatelli
u.broccatelli@tiscalinet.it